

☆☆☆☆ JANUARY ☆☆☆☆ 1941 ☆☆☆☆ JANUARY ☆☆☆☆

Nur rekto, kuraĝe kaj ne flankigante Ni iru la vojon celitan; Eĝ guto malgranda konstante frapante Traboras la monton granitan.

L'espero, l'obstino kaj la pacienso, - Jen estas la signoj per kies potenso Ni paŝo post paŝo post longa laboro Atingos la celon en gloro.

AMERICAN ESPERANTIST Vol. 55 AMERIKA ESPERANTISTO

ESTAS PORTO

ESTAS PORTO

LA MONATA BULTENO DE LA ESPERANTA-ASOCIO DE NORDA AMERIKA

Centra Oficejo Joseph Leahy, General Secretary 1410 H Street, N.W., Washington, D.C. Central Office J.R. Scherer, Pres. Los Angeles, Calif. -- E.G. Dodge, Ch. Exec. Comm. Wash. D.C.


Number 4 \$1. Per Year-anywhere * 10c a copy * JANUARY 1941

TUTKORAN BONDEZIRON POR LA NOVA JARO
XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX



1
9
4
1

LA ESPERANTISTOJ DE OKLAHOMA CITY
deziras al vi FELIĈAN NOVJARON —
SE vi NE FORGESOS la GRAVAJN DAT-
OJN en



E A N A Congress, July 4, 5, 6.
OKLAHOMA CITY VOKAS VIN

1941

*Sincere salutas vin
en la festtempo de bonvolo
kaj deziras por vi*

*Ĝojan Kristnaskon
Feliĉan Novjaron*

*Norio Jappan
George A. Connor*

FELIĈAN NOVJARON.

Nova la jaro! Esperon ĝi portas,
La estintaĵoj ĥo! pasis jam for.
Ni en memoro retemu la ĝojon
Kaj enteriĝu malbon' kaj dolor'.

Nova la jaro! Ni do kuraĝigu:
La malsukceŝon ja trafas timul';
Al nia celo ni forte klopu; —
Venos la venko, sed al kuraĝul'.

Nova la jaro! Al mond' militanta
Ja diŝtatiĝu la fratamafer',
Ĝis al ĉielo resonu la kanto,
Gloro al Dio, kaj paco sur ter'.

Jessie Scott, D.B.E.A.
Cleveland, Ohio.

"HOME-CIRCLE, HOME-TOWN, HOME-COUNTRY, HOME-WORLD."

Every Esperantist who wishes to stand "four square" to all his duties and privileges as a supporting pioneer in a movement like ours, should see to it that his dollars as well as his time are contributing to Esperanto in four spheres of necessary activity.

In his own home he should keep on reading and studying and should keep adding further books to his Esperanto book shelf.

In his city or community he should work in the local club if there is one; and if not, then he should gather and teach a class, with founding of a club as a goal in view.

In our country as a whole, he should always and without fail keep alive his active membership in EANA. (Are your \$2.00 dues for another year well paid in advance? Has there appeared a mark in your last number of Amerika Esperantisto to remind you that the year you last paid for has elapsed?)

And finally, in the Esperanto world at large, every convinced Esperantist should be an active member, an **INDIVIDUAL MEMBER**, of the Internacia Esperanto-Ligo. This is a good occasion to dwell on this point and enlarge upon it, since elsewhere in this issue you have found so good a proof of the valuable work IEL is doing for Esperantists everywhere, as a disseminator of information and of good cheer. Already every paid up member of EANA is automatically an associate member of IEL, but that means only that in the world organization of Esperantists he is a member "only twelve cents worth" -- because out of his two dollar membership EANA sends 12 ¢ to IEL, as promised when EANA allied itself with IEL as a "landasocio." But the fully alive and truly convinced Esperantist will not be contented with that slender participation in the international Esperanto league. He will want to be a member in his own individual right, -- at least to the extent of \$1.00, receiving the **JARLIBRO**, but preferably to the extent of \$2.00, so as to receive both the Jarlibro and the magazine, "Esperanto Internacia." EANA officially encourages its members to be also members of IEL, by a 25 ¢ reduction when both memberships are combined. That is, EANA membership plus the Jarlibro (which together would be \$3.00) can be obtained for \$2.75, sent to the EANA office in Washington, 1410 H-St., N.W. Similarly \$3.75 for \$4.00 value, when the Esperanto Internacia is included.

Here is one word for the wise, the Esperantist who has an understanding heart. It is shortsighted for anyone to complain or grow cold in his support of the international organization, IEL, just because now during war conditions the physical bulk of Jarlibro or of magazine is necessarily curtailed in comparison with what was received in times of peace. Every page that comes to us now from Esperanto organizations with the courage and optimism to maintain their activities in Europe is saturated with the life blood of a noble faith and loyalty. Of greater value, therefore, than ever. And more than ever needing your support.

WE ARE AMERICANS.

W
E
★
A
R
E
★
A
M
E
R
I
C
A
N
S

English, Scottish, Dutch and Finn
French and Irish all mixed in.
We are Americans!

Swede and Polack, Czech and Jew,
Swiss and German, Latins too.
We are Americans!

Norse, Italians, Portuguese,
Our citizens are made of these.
We are Americans!

U S A




Capitol



Forget all narrow birth-land ties,
Your future in this good land lies.
We are Americans!

From despots' rule you sought relief,
Came to this land beyond belief.
We are Americans!

Lay aside all racial claim,
Let this your country be your aim.
We are Americans!



W
E
★
A
R
E
★
A
M
E
R
I
C
A
N
S

* * LOOK! LISTEN! HERE IS WHAT YOU CAN BE DOING * *



ESPERANTO WEEK

Every last member of EANA should be working hard to do his share to help our Movement and our Association along. Whether YOU live in the smallest hamlet or the greatest city, there are many people whom YOU can tell about Esperanto and with whom YOU can share Esperanto and EANA. Start right in NOW so that when "Esperanto Week" (April 20 to 26) comes around, and everyone is celebrating by speech and by song, YOU will have actual deeds well done to your credit.



Here are some of the things YOU can be doing:

- * * * * 1. Talk with other members to encourage them to even greater effort and cooperate with them in anyway possible.
- * * * * 2. In your conversation with others make it a point to casually mention Esperanto and what a boon it is to those who know it.
- * * * * 3. When a person shows any interest in Esperanto, send his name and address to our General Secretary.
- * * * * 4. If a person shows a real interest, give him an opportunity to contribute to our work and send in his name for membership. He does not have to KNOW any Esperanto to join EANA - only to be sympathetic to our aims.
- * * * * 5. Try to give talks on Esperanto to informal groups of friends or to organizations of which you are a member. Get a chance to speak at other meetings thru one of their members whom you may know - they will be glad to get a speaker.
- * * * * 6. Be alert to get an item printed in your newspaper, or better still, write an article on Esperanto for a magazine.
- * * * * 7. Keep in touch with film booking agencies (or directly with the Managers of the theaters) to know just where and when the films will be shown which contain Esperanto (look in your copies of AE for descriptions). Then discuss with the theater Manager how you can help to advertise this showing for him (by announcement in society meetings, theater party on opening night, extra news items on Esperanto features, etc.). At the same time, get permission to put posters in the lobby and to have someone there (at least during the busy hours) to give out leaflets and answer questions.
- * * * * 8. Any person who has studied Esperanto a year or two, certainly can act as a leader for a group of beginners who wish to learn it. If each member of EANA would do this once each year, think what an awakening Esperanto would have in this country. So organize a group and see how interesting and enjoyable it is to help others, even if you do not call yourself a "teacher".
- * * * * 9. If a few study groups are established or if any suitable group can be assembled, in a community where there is no local society, organize them into a local Esperanto Society and, if possible, become a Chapter of EANA. Why not form a few local Societies each year?

HAVE YOU NOTED CAREFULLY WHAT YOU CAN DO? GET BUSY

EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF EANA and I E L and bring in his neighbor-let all enjoy the light.

Issued monthly during the school year by the Youth Committee, The Esperanto Association of N. America.

★ Estu Preta ★

Esperanto for Youth

Winchester, Illinois, U.S.A.

Designed to help young people learning Esperanto, the international auxiliary language.



Al Esperantistoj Kiuj Volas

Helpi en la Propagando:



La Junulara Komitato aranĝas projekton laŭ kiu reklamoj pri Esperanto sendiĝos al publikaj bibliotekoj en mil usonaj urboj. Ĉiu sendaĵo konsistas el: 1) "Estu Preta" afiŝo; 2) "Estu Preta" ŝlosilo; 3) letero klariganta pri Esperanto kaj petanta ke la libroristino pendigu la afiŝon.

La mona valoro de mil sendaĵoj ĉi tiuj estas \$25.00 aŭ pli. Pri tio la Komitato jam prizorgis.

Ni esperas ke la Esperantistoj volos helpi la komitaton pri la send-kosto. La afranko por la mil sendaĵoj kostos \$15.00. Al ĉiu donacinto ni sendos detalan raporton pri la uzo de lia donaco.



La Junulara Komitato
Winchester, Illinois

"ESTU PRETA" No.9, issued by the YOUTH COMMITTEE (George J. Falgier, Chairman) Winchester, Ill. is ten pages of illustrated interest, lessons, and newsy matter, so presented that all may read, whether they know Esperanto or not. A special chapter is devoted to Scouts, with Scout legend in 16 languages, how to win Merit badges, etc. NEPRE get your copy--5c ONLY.



ESPERANTO PROGRESAS DIVERSMANIERE EN NOV-JORKO

"Vogue" Bildigis Esperantistinon. Tiu konata gazeto pri la modo, aranĝis tre belan kaj unikan fotografadon por la kovrilo (15-an de Decembro), kiel Kristnask-saluto al la legantaro. "La Modo" elektis Maurine Zollman por esti la modelo. Maldekstre troviĝas la bela rezulto. Maurine partoprenas Ĉe-kurson de Doris Tappan. Unue, troviĝas Esperantistino sur la kovrilo; poste, ni esperu, la lingvo Esperanto en la enhavo !

Esperanto-Rondiro en "Macy's". La plej granda magazeno en la mondo, aranĝas rondiron "malantau la scenejo en Macy's" komencan de Januaro. F-ino Eleanor Anderson, sperta turgvidistino kaj lerta Ĉe-kursano, kondukos ĝin esperante.

Bona Trio! Doris, Esperanto, La Unua Premio! En la programo de Profesoro "Quiz", konata radio-dissendo, antaŭvesperon de Kristnasko, Doris Tappan ne nur reklamis Esperanton sed gajnis la premion!

Esperanto-Klubo "Praktiko" Festis 'En Hindujo'. Okaze de 'Diplomiĝo' de Ĉe-kursanoj, dum 'vizito al Hindujo', la klubanoj multe ĝuis kunvenon de plezuro, kiel montriĝas en la anonco kaj menuo sube:

"PRAKTIKO"

La Esperanto-Ligo de Nov-Jorko festas per Hinda manĝo, bona muziko, ĝoja kantado, Esperanta konversacio, kaj moviganta filmo:

**Forte !
Kuraĝe !
Elegante !**

La kunveno speciale festas la prezentadon de Cseh-Institut-Atestoj, al la jenaj kursanoj de F-ino Doris Tappan:

- Pierce S. Elsasser
- Samuel Gahan
- John H. Hines
- David Jagerman
- Joseph Milan
- Francois Mousseau

Je la 7-a p.t.m., Vendrede, 20-an de Decembro

MENUO

Hakita Kokidhepato, Pastrulita (Pastola)
Juna Kokoso, Cejlona (Curumba)

SUP-ELEKTO

Supo de Kokoso, Hinda
Supo de Viando, Spicita (Mulligatawny)
Supo de Kokido kun Rizo
Supo de Legomoj

ĈEFPLADO (inkluzive)

Kurio de Bovaĵo kun Rizo (Curry)
Legomoj kaj Lentoj (Dahl), Kuriigitaj
Pladeto de Ĉatnioj (Chutney)
Patkuko de Rizo (Papdum)

DESERT-ELEKTO

Cejlona Pudingo
'Halva' Sukeraĵo (Haluwa)

TRINK-ELEKTO

Trinkaĵo de Tamarindo, Hinda
Teo - Kafo - Lakto

ALL THE ABOVE MENTIONED PERSONS ARE ON THE E A N A LISTS

EUROPEAN ESPERANTO NEWS, BROUGHT THROUGH OUR "I.E.L."

The main office of the Internacia Esperanto-Ligo is in England, at a safe distance outside of London. That office is still functioning, and from it there has recently been distributed a 48-page supplement to the 1940 "JARLIBRO."

But because England is a nation at war, some phases of the activity of IEL have been taken over by its branch office in Sweden, where the active guiding member is E. Malmgren, the Vice-President of IEL. A 4-page mimeographed bulletin has just been distributed from this branch office. A portion of its contents is reproduced below because of its interest for all Esperantists everywhere. (Among the news items from various countries, we can give space for only those countries whose Esperanto news is now most interesting.)

Members of EANA should also be full or "individual" members of IEL. See elsewhere in this number a short discussion of services by, and our duties toward, the Internacia Esperanto-Ligo.

Heart-touching are the sentiments expressed below by Sano Malmgren, in sending a message of good cheer to Esperantists in lands now plowed and harrowed by war or by persecution.

BULTENO DE I.E.L. Eldonita de Filia Oficejo de I.E.L. Stockholm. Oktobro, 1940.

Restu fidela. Kiam la estraro de IEL finis la paskan kunsidon en la jaro 1939, ni diris unu al la alia: "Ĝis la revido, post la milito." Tiel konvinkitaj ni estis, ke la milito eksplodos. Kaj kiam ni laŭstatute havus la paskan kunsidon en 1940, la milito jam atakis kaj morte vundis multajn landojn. Hodiaŭ la kondiĉoj estas eĉ pli severaj, ĉar korespondado estas tute nebla inter pluraj landoj.

Por nun krei provizoran ligilon inter la membroj de IEL, la Filia Oficejo en Stockholm eldonas de tempo al tempo malgrandan bultenon. Kaj por havi eblecon atingi kiom eble plej multajn amikojn en Eŭropo, la bulteno aperos ne nur en Esperanto, sed eventuale ankaŭ svede kaj germane.

Tiu ĉi bulteno intencas diri al vi: "Esperanto vivas. Ĝiaj amikoj tra la mondo pensas pri vi, ĝuste pri vi." La bulteno do estos al vi eta flamo de lumo, memorigante vin pri feliĉaj tagoj pasintaj - kaj estontaj. El ĝi vi ĉerpu fortojn por konservi vian fidon je la estonto. Ĉar estu certa je tio, ke la hodiaŭa tago ne estas la lasta. Venos morgaŭo, kiam vi kaj mi, - jes, ni ĉiuj - denove renkontiĝos kaj premos amike reciproke la manojn. . . "sed ne kiel venkitoj aŭ venkintoj, ne kiel subuloj aŭ regantoj - sed kiel egalrajtaj, liberaj amikoj," skribas prave nia Esperanto-verkisto Stellan Engholm en la septembra numero de la sveda Esperanto-gazeto.

Ho, amikoj, la nuna situacio premas vin, suferigas vin. Kaj la penado por la ĉiutaga pane kaj por tolerebla vivo tute kaptis viajn fortojn kaj vian intereson. Sed lasu al mi memorigi vin pri nia kanto "La espero," kaj pri la momentoj, kiam ni kune kantis la himnon. Amiko, antaŭ ol vi daŭrigas la legadon de tiu ĉi bulteno, mi petas vin, ke vi fermu viajn okulojn por mallonga momento, kaj ke vi flustre kantu antaŭ vi mem nian himnon. Pensu pri la enhavo. Jes, flustre kaj humile kantu la himnon.

Ĉu vi nun rimarkas, ke via koro estas ĝismorte katenita al Esperanto, eĉ se via lango devas silenti? Ĉu vi rimarkas, amiko, ke kiam vi kantis, vi havis ĉirkaŭ vi milojn da amikoj el la tuta mondo? Ĉu vi do ne eltenu? Jes, vi restos fidela! Por eterno
fidela! E. Malmgren, Vicprezidanto de IEL.

La teritorioj de I.E.L. laboras.

"La laboro de IEL estas la laboro de la aliĝintaj asocioj." Certe do estas el intereso konstati la agadon de la diversaj landaj asocioj. Ni rigardu kelkajn landojn.

Hungarujo. La 11-13 majo okazis la jarkunveno de la Hungara Esperantista Federacio en la urbo Kalocsa. Ĉeestis ne malpli ol 250 gesamideanoj. La jarkunveno estis pompe aranĝita. El la programo ni citu: Ekspozicio, ekzamenoj, fakakunsido de skoltoj, instruistoj k.a. Ni gratulas niajn hungarajn amikojn pro la sukceso de ilia kongreso.

Italujo. Tie la Esperantistoj ĝis oktobro eldonis la radioprogramojn en Esperanto. Radiajn dissendojn en Esperanto ankaŭ estonte okazigos la itala ŝtata radio.

Nederlando. En Nederlando la Esperanto-kluboj nun, en tiu ĉi aŭtuno, komencis denove okazigi siajn regulajn kunsidojn. Ni gratulas! Laŭ letero de s-ro Jung, li intencis

aperigi septembran numeron de Heroldo de Esperanto. Sed laŭ lia lasta lasta letero li nun devas prokrasti tion. Li ankaŭ informis ke ges-oj Isbrücker kaj pastro Cseh fartas laŭ la cirkonstancoj bone. Pri militviktimoj inter la Esperantistoj oni feliĉe ne anoncis al ni.

Norvegujo. Tiu lando vere mirigis nin plej multe. Ĝus atingis nin nova numero de ilia gazeto "Norvega Esperantisto," kie ili informas, ke ili intencas en la aŭtuno daŭrigi sian laboron. Ili eĉ havis animan forton ĝuste nun pretigi novajn statutojn por la norvega instituto, t.e. fiksi novajn regulojn por la norvegaj Esperanto-ekzamenoj. Kaj en la gazeto ili pledas por plifortigo de la Esperantista kvalito. Plie la norvega ligo dissendas cirkulerojn pri kunvoko al neordinara jarkunveno de la norvega ligo. La jarkunveno okazos 1-3 nov. IEL sendas al la norvegaj amikoj plej korajn bondezirojn kaj prezentas sian admiron pro nefleksebla energio, persisto kaj progresemo.

Svedujo. Svedujo vivas ĝis nun en paco, sed multaj svedaj Esperantistoj estas vokitaj servi kiel soldatoj ĉe la landlimoj. Pro tio la agado de la Esperanto-klubo, speciale printempe, estis sufiĉe nevigla. Sed la lastaj informoj montras je granda plifortigo de la agado. La Esperantistoj ne hezitas komenci energian propagandon kaj starti novajn kursojn. Ankaŭ en kelkajn novajn mediojn Esperanto empenetris. Ekz. inter la abstinenculoj fondiĝis en Stockholm la unua sveda Esperanto-loĝio, kie ĉiuj programoj kaj ceremonioj okazas en Esperanto.

Cetere la sveda Esperanto-gazeto aperas ĉiunmonate tute regule, kiel antaŭ la milito. El la enhavo estas speciale atentinda la raporto pri la jarkunveno de la Sveda Esperanto-Federacio, kiu kunveno okazis la 13-14 julio en Stockholm. Partoprenis pli ol 100 personoj el la tuta lando, kaj regis plej komplementa harmonio kaj optimismo, oferemo kaj laboremo. La plej grava decido - kaj pli malpli unika en la Esperanto-movado - estis, ke la sveda federacio decidis dungi sindikon, kiu dediĉos sian tutan tempon por viziti la klubojn en la tuta lando, starigi novajn klubojn kaj organizi kursojn ktp. La svedoj nun kolektas monon por tiu aranĝo. Jam estas kolektitaj pli ol 1,000 sved. kr. por la jaro 1940, kaj same multe por 1941 kaj 1942. Kandidato por la sindika ofico estas la Esperanto-instruisto Tib. Morariu, nun sveda ŝtatano.

Fine nia bulteno povas informi la Esperantistan mondon, ke en Estonio la Esperantistoj komencis ludi gravan rolon. Ni citu kelkajn nomojn: Neeme Ruus, tre konata Esperanto-gvidanto en Estonio kaj antaŭ kelkaj jaroj Esperanto-instruisto en svedujo, nuntempe funkcias kiel socia ministro en la Estona sovjeto. La ĉefministro d-ro Johannes Vares-Barbarus antaŭ kelkaj jaroj estis estrano de la Esperanto-klubo en la banurbo Pärnu. Kaj s-ro A. Valsiner, nun vicministro por klerigo, iam apartenis al la estraro de la Esperanto-klubo en Kuresaare. Estas ankaŭ interesa fakto, ke en la nova estona parlamento 15% estas Esperantistoj. Notinde estas ankaŭ, ke la eminenta Esperantistino Helmi Dresen en Tallinn fariĝis membro de la urbestro en Tallinn. IEL gratulas niajn estonajn gesamideojn kaj esperas, ke ili povos en la novaj laborkondiĉoj aktive helpi kaj subteni la Esperanto-movadon, speciale en ĉiuj sovjetaj ŝtatoj.

R A D I O .

Bulgarujo. Merkrede je 21,55: Sofio, 351 m. (Dissendo ĉiun duan merkredon ekde 14 aŭg.)

Estonio. Dimanĉe je 22,20 (event. 21,20): Tŭri, 410 m.

Hungarujo. Lunde kaj jaŭde je 23,20: Budapeŝto, 549 m.

Italujo. Sabate je 15,05: Roma 2RO 8, 16,84 M., 2RO 14, 19,70 m, 2RO 15, 25,51 m.

La tempoj ĉiam estas necertaj, la vivo de la homo estas mallonga, sed eterne brilos la stelo de la espero kaj la sopiro al feliĉo. Vivu la sankta flamo de la idealismo!

Sindone kaj amike via -- E. Malmgren.

LEARN ESPERANTO BY CORRESPONDENCE. Beginners and Advanced. Instructor licensed by EANA as teacher. Address: "ESPERANTO-BY-MAIL", St.Albans, N.Y.

ANOTHER OLD MEMBER of EANA has passed away, on Oct.6th'40, at the home of her daughter-Mrs.Emily G.Parnell, in Sebastopol, California, Mrs.Sarah M.Giese, aged 83, buried in Philadelphia, Pa. Two sons-George J. and Frank L. live in Philadelphia. Condolence.

MANY SMALL ITEMS, and "clippings" had to be pigeon holed, for lack of space. Bedaŭras.